Marto 2025

# Ĝis Cent

*Siège : 7, rue Major-Martin 69001 Lyon - Sur RDV mercredi de 17h30 à 20h00*
*Contacts : +33 (0)7 69 29 82 97 – esperantoliono@gmail.com*
*Sites Internet : https://esperantolyon.org www.esperanto-france.org*




## KALENDARO

Siège et Bibliothèque : sur RDV les mercredis.

Nouveaux cours en ligne niveau A2 - B1 le jeudi soir !

Cours en ligne pour débutants le lundi soir à 18h30 - COMPLET

***

KoToPo : “Kiel Vi” tous les derniers mardis du mois

UAICL : “Babilrondo” chaque lundi soir

***

Assemblée Générale : Mardi 11 mars à 18h45 (accueil des membres à partir de 18h30) au KoToPo, et à distance.

## KOLOFONO

Provlegita kaj korektita de Thierry TAILHADES
https://tjerielliono.blogspot.com/

Aŭtoro: Marc-Olivier GRAZIANI

## ANTAŬPAROLO

**Karaj Membroj kaj Amikoj,**

Ĉi tiu monato estis trankvila por nia asocio, sed tio ne signifas ke ni faris nenion! Niaj agadoj daŭras kun la sama energio kaj entuziasmo. La kursoj, renkontiĝoj kaj aliaj iniciatoj sekvas sian vojon, dum ni iom post iom adiaŭas la vintron kaj bonvenigas la printempon.

Kaj kiu diras printempon, tiu diras novan komencon! Pri tio, ne forgesu ke nia jara kunveno alproksimiĝas, kaj ĝi estas bona momento por konsideri la pasintan jaron, pripensi novajn projektojn kaj konstrui la estontecon de la asocio kune. Ĉi tiu grava rendevuo okazos marde, la 11-an de marto je la 18:45 ĉe KoToPo.

Ni ĝojas renkonti vin baldaŭ kaj deziras al vi belan komencon de printempo!

Amike,
Marc-Olivier GRAZIANI

ESPERANTO LYON

☛ **BEMI en Liono:**

Neil raportas al ni, ke BEMI pasis tra Liono la 13an de februaro, kaj malgraŭ la pluvo, li sukcesis bicikili kun ili.

BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) estas grupo de esperantistoj, kiuj ĝuas bicikli kaj uzi Esperanton kiel komunan lingvon. Fondita en 1981, BEMI fariĝis la unua faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). La organizo celas aranĝi almenaŭ unu internacian biciklokaravanon ĉiujare kaj funkcias kiel kontakto por biciklantaj esperantistoj tutmonde. Interese, BEMI ne havas oficialan membrecon; se oni biciklas kaj uzas Esperanton, oni rajtas nomi sin BEMIano. La membroj kunvenas dufoje jare: somere dum la Internacia Junulara Kongreso (IJK) kaj vintre dum la Junulara E-Semajno (JES). bemi.tejo.org

☛ **Loka Komunikado en telegram:**

Ni deziras informi vin, ke ekzistas de longa tempo Telegram-grupo por esperantistoj en la regiono Rodano-Alpoj. Ĉi tiu grupo, nomata "Esperanto en Rhône-Alpes", celas kunigi esperantistojn de la regiono por diskuti, kundividi informojn kaj organizi eventojn. Aliĝante al la grupo, vi povos konektiĝi kun aliaj lokaj esperantistoj kaj resti informita pri estontaj renkontiĝoj kaj agadoj. Por aliĝi, serĉu "Esperanto en Rhône-Alpes" en Telegram aŭ vizitu la retejon Telegramo.org, kie vi trovos liston de diversaj Esperanto-grupoj, inkluzive de tiu por Rhône-Alpes : https://rodanoalpoj.telegramo.org/

☛ **Pri KoToPo:** Neil ĝojas anonci, ke por niaj renkontiĝoj ĉe KoToPo, ni havas novan maskoton por helpi vin elekti nian tablon! Ĉi-foje, ili estis kvin homoj, kiuj ĝuis la vesperon kune. Memoru, ni renkontiĝas ĉiun lastan mardon de la monato ĉe KoToPo por la evento "Kiel vi". Venu kun ni por praktiki Esperanton kaj amuziĝi!



☛ **Mi vizitis la ekspozicion pri Zurbarán en Liono** - Marc-Olivier GRAZIANI

Mi vizitis la ekspozicion "Zurbarán" en la Muzeo de Belartoj en Liono. Ĝi estas mirinda ekspozicio pri la hispana pentristo Francisco de Zurbarán kaj lia arto.



Unu el la plej impresaj momentoj estis en granda ĉambro kun tri pentraĵoj de Sankta Francisko. Ili staras antaŭ ni, kvazaŭ vivantaj. La etoso estas solena kaj profunda. Vere eksterordinara sperto!

La ekspozicio ankaŭ montras, ke la influo de Zurbarán daŭras ĝis hodiaŭ. Ni povas vidi modernajn artaĵojn, modon kaj fotojn inspiritajn de lia stilo. Lia maniero ludi per lumo kaj ombro ankoraŭ fascinas artistojn en la 21-a jarcento.

